

ĜI ESTAS LA PLEJ MALGRANDA EL ĈIUJ SEMOJ, SED FARIĜAS PLI GRANDA OL ĈIUJ LEGOMOJ.

Komento al Evangelio de p. Ricardo Perez Marquez (dum la hospitalrestado de Alberto Maggi)

El la evangelio laŭ Marko 4, 26-34

En tiu tempo Jesuo diris al la homamaso: «La regno de Dio similas al semoj, kiujn iu ĵetas en la teron. Ĉu li dormas aŭ viglas tage aŭ nokte, la semo burĝonas kaj kreskas, kaj li tute ne scias kiel. Per si mem la tero kreskigas la rikolton, unue tigon, poste spikon, poste maturan grenon. Kiam la frukto estas preta, tuj oni svingas la falĉilon, ĉar venis la tempo de la rikolto».

Jesuo ankoraŭ diris: «Al kio ni komparu la regnon de Dio aŭ per kia parabolo ni montru ĝin? Ĝi estas kiel sinapa semeto: kiam oni semas ĝin en la teron, ĝi estas la plej malgranda el ĉiuj aliaj semoj. Tamen, semite, ĝi kreskas kaj fariĝas pli granda ol ĉiuj legomoj de la kampo. Kaj ĝi elmetas tiel grandajn branĉojn, ke sub ĝia ombro povas nesti la birdoj de la ĉielo». Per multaj tiaj paraboloj Jesuo anoncis al ili sian mesaĝon, kiel ili povis kompreni. Kaj sen parabolo Li ne parolis al ili. Sed al siaj disĉiploj Li private klarigadis ĉion.

Por konkludi la paroladon pri la paraboloj, entenataj en ĉapitro 4 de la evangelio de Marko, Jesuo prezentas du parabolojn kiuj anoncas la potencialon, la potencon kaj la forton kiu enestas en lia mesaĝo. Ni aŭskultu, ĉapitron 4 de Marko, versiklon 26.

Estas dirite *La regno de Dio...*, ni scias la Regno de Dio estas la alternativa socio kiun Jesuo venis por proponi, socio en kiu anstataŭ amasigi por si mem enestu la ĝojo kunpartigi, kaj kie anstataŭ ordoni enestu la servado.

Similas al semoj, kiujn iu ĵetas en la teron. Jam en tiu ĉi ĉapitro Jesuo parolis pri la semanto kiu ĵetas la semon. La semo estas lia vorto, lia mesaĝo. La prefero de Jesuo por bildoj kiuj referencas al la kampara vivo indikas ke en lia mesaĝo, en lia bona novaĵo, estas forto kiu senbridigas la vivigan proceson por la kresko kaj maturiĝo de la individuo.

Diras Jesuo: *Ĉu li dormas aŭ viglas tage aŭ nokte, la semo burĝonas kaj kreskas, kaj li tute ne scias kiel. Per si mem la tero kreskigas la rikolton, unue tigon, poste spikon, poste maturan grenon.* Tiu kreskado referencas al kiam Jesuo parolis pri la produktado de la tridekoblo, la sesdekoblo kaj de la centoblo, kaj pri la invito kiun li faris al siaj disĉiploj: *per la mezurilo per kiu vi mezuras, nome tion kion vi donas, vi estos mezurataj.*

Tio kion Jesuo certigas al ni kaj kion li volas diri estas ke la asimilado de la mesaĝo estas intima kaj persona proceso en kiu neniun rajtas intermetiĝi. *Kiam la frukto estas preta,* en tiu punkto la evangeliisto utiligas la verbon "transdoni", kiu estas la sama kiun li utiligos por la perfido, la transdono de Jesuo. Kion signifas "kiam la frukto estas preta por esti transdonata?"

Transdoniĝi signifas kunlabori al la viviga agado de Jesuo ĝis la fino, ankaŭ je risko de propra vivo. *Tuj oni svingas la falĉilon, ĉar venis la tempo de la rikolto.*

Tiu estas la bildo de granda ĝojo. Oni devas referenci al la kampara mondo kiam la festo de la rikolto estas la la plej grava, sufiĉas pensi kiel ĝi estas kantata kaj hosanata en la Psalmoj. La psalmo 126 kie legeblas *Li rikoltos kun ĝojo.*

Ĝi ne estas do negativa bildo, juĝobildo, sed estas la bildo de la plena ĝojo, la persono realigas sin mem kaj eniras la plenan feliĉon kiam, kiel Jesuo, tiu sukcesas donaci sin mem.

Tio kion Jesuo estas al ni certiganta estas ke la homo kaj la mesaĝo de Jesuo estas farataj unu por la alia. Se ili ne renkontiĝas, ili restas sterilaj, sed kiam ili renkontiĝas la homo potencigas kaj

liberigas ĉiujn tiujn potencialojn, tiujn fortojn, tiujn amenergiojn kiujn la renkontiĝo kun la vortoj de Jesuo, la renkontiĝo kun la bona novaĵo, sukcesas liberigi.

Kaj daŭrigas Jesuo: *Al kio ni komparu la regnon de Dio aŭ per kia parabolo ni montru ĝin?* Kaj je tiu punkto Jesuo referencas al tradicia bildo entenata en ĉapitro 17 de profeto Ezekielo, en kiu la regno de Dio estis imagata kiel cedro, la reĝo de la arboj, sur tre alta monto, io kio alvokas atenton pro ĝia grandiozeco. Nenio el ĉi tio. Diras Jesuo: *Ĝi estas kiel sinapa semeto, la sinapa semeto, ni tion scias, estas malgranda, ĝia diametro estas eĉ ne milimetra, kiam oni semas ĝin en la teron, ĝi estas la plej malgranda el ĉiuj aliaj semoj. Tamen, semite, ĝi kreskas kaj fariĝas pli granda ol ĉiuj legomoj de la kampo.* Kaj je tiu ĉi punkto Jesuo kreas atendon.

Iuj atendus, konante la profetaĵon de Ezekielo, ke el tio naskiĝos la plej granda el ĉiuj arboj, male Jesuo diras tre hironie: *Kaj ĝi elmetas tiel grandajn branĉojn, ke sub ĝia ombro povas nesti la birdoj de la ĉielo.*" La sinapoarbo, la sinapoarbusto kreskas en la hejma legomĝardeno. Ĝi estas sensignifa arbusto, ne alvokas atenton pro ĝia grandiozeco. Ĝi atingas altecon de unu metro kaj duono en la plej taŭgaj lokoj, laŭlonge de lago de Galileo foje ĝi atingas eĉ trimetran altecon, sed ĝi estas komuna planto, eĉ ĝi estas truda, kaj ne alvokas atenton.

Kion volas diri al ni Jesuo? Ke la regno, ankaŭ en la momento de ĝia plej granda evoluo, ne estos evidenta, triumfeca, spektakla, sed modesta realaĵo. Per tiuj malmultaj vortoj do Jesuo certigas al tiu kiu akceptas lian mesaĝon ke tiu alportos fruktojn, ĉar ĝi havas grandan potencon, nur ĝi postulas paciencon, ĉar la kreskoproceso estas malrapida.

La alia mesaĝo estas ke la regno de Dio jam ekzistas, oni ne devas atendi kiu scias kiajn spektaklajn manifestiĝojn de tiu regno, temas pri realaĵoj etaj, modestaj, sed vivaj kaj vivigaj. La regno de Dio do ekzistos kie estas la komunumoj kiuj akceptis lian mesaĝon.

Konklude, *Per multaj tiaj paraboloj Jesuo anoncis al ili sian mesaĝon, kiel ili povis kompreni.* Kial kiel ili povis kompreni? Ne temas pri oreloj, pri aŭdado, sed temas pri amo, pri koro.

Tiom kiom oni kapablas kiel Jesuo donaci propran vivon, oni komprenas lian mesaĝon. Kaj poste konkludas la evangeliisto: *Kaj*

sen parabolo Li ne parolis al ili. Sed al siaj disĉiploj Li private laŭlitere "aparte". Tio estas la unua el la sep fojoj en kiuj la evangeliisto utiligos tiun interpretŝlosilon. Ĉiun fojon kiam li utiligas la esprimon "aparte", tio signifas nekomprenon, se ne eĉ malfavoron flanke de liaj disĉiploj.

Estos ankoraŭ longa vojo irenda antaŭ ol ili komprenos la realon de la regno de Dio.